SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr

POR LA PACO !

Senminigo en Kroatio kiel konsekvenco de militaĉo en eksa-Jugoslavio.

Fotis : ge-Weiss

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

Oktobro 2005 76-a jaro, n-ro 10 (1204)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

El la redaktejo...

Karaj,
jam estas oktobro kaj alproksimiĝas plia fino de la jaro. Ankaŭ en tiu ĉi numero vi trovos interesajn artikolojn inter kiuj ankoraŭ pri la pasinta kaj venonta kongresoj.
Ni faru ĉion por ke la Beograda kongreso estu granda sukceso laŭ la nombro de partoprenantoj kaj la kongresaj laboroj. Aliĝu do jam nun kaj profitu de plej malmultekostaj tarifoj. Helpu al la OKK sukcesigi ĝin.
Pensu ankaŭ pri la kotizpagoj, por ke nia Asocio povu normale funkcii kaj doni al vi ĉiujn servojn kiujn vi rajtas ricevi. Ni scias ke vi estas membroj de multaj Asocioj, sed ĉijare SAT estu por vi la unua kaj la plej grava. Ni agu komune por alia pli bona mondo.

0000000000000000000000000000000

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Pliaj pageblecoj:
Per kreditkartoj: VISA, MasterCard (+2%)
Al nia konto ĉe UEA: satx-s
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❒
Imprimé par : EDRB, Avenue Mozart, FR-75016 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

GRATULON !
K-do Max Finkenzeller
100-jara

Hodiaŭ (09.09.2005) okazis en pensiula hejmo en Vieno la 100-jara naskiĝdatrevena festo por k-do Max FINKENZELLER (25.490). Li ege ĝojis ke ankaŭ tri geesperantistoj partoprenis (AEF-vicprezidanto d-ro Michael MAITZEN, Elisabeth HLAUSCHEK kaj mi).
De la ŝtatprezidento d-ro Heinz FISCHER li ricevis belajn florojn kun letero en kiu la prezidento rememoris pri la persona konatiĝo kun li, kiel naturamiko. Ĉiuj flegistinoj dancis kun li, ĉar li estas la sola viro en la hejmo, kiu ankoraŭ povas gvidi la virinojn dum dancado.
Max (Makso) ankoraŭ ludas kun la kuracistoj ŝakon kaj gajnas el 10 partioj 9, sed ne ĉar la kuracistoj ne volis gajni.
Tiu raporto estas ankaŭ vivsigno pri Max por multaj esperantistoj kiuj dum kongresoj jam demandis min, ĉu li ankoraŭ vivas.

Amike, Leopold PATEK

POST 50 JAROJ
SAT DENOVE KONGRESOS EN BEOGRADO

Profitu de la plej favoraj kondiĉoj kaj aliĝu tuj!
Tre interesa programo kaj familia, kamaradeca SAT-etoso atendas vin.
Informoj aperas en ĉiu numero de Sennaciulo kaj en la reto:
http://users.pandora.be/jakvo/SAT/SAT-Beogrado.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Por PACO !

PORPACA SAT-AGADO

Ekzemplo de ge-kdoj Colette kaj André Weiss

Ofte oni demandas: Kion faras SAT ? La respondo estas: SAT faras tion kion faras ĝiaj membroj, ĉar SAT estas SAT-anoj. Antaŭ iom pli ol du jaroj, niaj gekamaradoj Colette kaj André Weiss informis nin pri siaj agadoj en la batalo por la detruo de kontraŭpersonaj minoj. Unu el plej proksimaj minitaj terenoj troviĝas en Bosnio-Hercegovino kaj Kroatio. La celo de ilia laboro estas puŝi la francajn instancojn finance helpi la senminigon sur tiuj teritorioj. Por ke tiu agado estu pli oficiala ili kontaktis la P.K. de SAT kun propono ke cxio estu farata nome de SAT kaj ke por la skribaj interŝanĝoj oni uzu la oficialan paperon de SAT. La PK kun ĝojo akceptis tiun proponon, ĉar tio estas bela ekzemplo de konkreta politika kaj porpaca agado de SAT-anoj, t.e. de SAT.



Colette kaj André Weiss

Niaj gekamaradoj tuj skribis pri tio al Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino kaj al Kroata Esperanto-Ligo, kun propono, ke ili estu surlokaj perantoj inter SAT kaj la landaj centroj por senminigo. Nur tiu lasta pozitive respondis kaj ekde tiam komenciĝis la kunlaboro inter SAT kaj KEL sur tiu tereno. KEL iĝis peranto inter SAT kaj Kroata Centro por Senminigo (HCR) en la kroata urbo Sisak.

Komuna delegacio de SAT kaj KEL ĉe Kroata Centro por senminigado (HCR) en urbo Sisak..

Aliflanke, cele al tiu agado, niaj gekamaradoj kontaktis en Francio la francan deputiton, s-ron François Rochebloine, kiu kun ili agadas ĉe la Franca Nacia Komisiono por la Elimino de Kontraŭpersonaj Minoj (CNEMA). Ili daŭre klopodas ke la franca ŝtato regule kontribuu finance al la senminigo de Kroatio. Danke al tiuj intervenoj jam de tri jaroj Francio donis po 100.000 € tiucele.

Evidente, ilia aktiveco ne konsistas nur el tio. Ili aktive kunlaboras kun la deputito François Rochebloine pri franca leĝpropono por plivastigi la kampon de Intervenoj de la Franca Nacia Komisiono por la Elimino de Kontraŭpersonaj Minoj (CNEMA).

La mocio pri tiu porpaca agado de niaj gekamaradoj, do de SAT, aperas ankaŭ en la lastjara kaj ĉijara kongresaj Deklaracioj.

Dum la ĉijara kongreso en Zagrebo la komuna delegacio KEL-SAT vizitis la Kroatan Centron pri Senminigo (HCR) en urbo Sisak, kie post la prezento de la agado de tiu Centro oni vizitis terenon inter la urboj Sisak kaj Petrinja, kie la skipoj de seniminigado daŭre laboras. Pri tiu vizito aperas fotoraportaĵo en la septembra numero de Sennaciulo.

Jen bela, sekvinda, ekzemplo de agado de SAT (-anoj). La lukto por la paco daŭras.

K. Barkoviĉ

EKSPOZICIO EN PARIZO : "MEMORI - HIROŜIMO, 60 JAROJN POSTE"

La delegacio de la PK de SAT kaj de la Pacista Frakcio de SAT vizitos ĝin kaj kontaktos kun la respondeculoj de la ekspozicio. Tio estas unua fojo ke tia ekspozicio okazas en iu lando kiu posedas nukleajn armilojn. Pri tio ni raportos en Sennaciulo.

Pacista Frakcio de SAT